



ESPERANTO

NORMANDA BULTENO

Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj - ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 8 Eŭroj Union des Esperantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

CONTINUONS NOS ACTIONS

Durant le mois de juin, des espérantistes ont, pour la première fois présenté des listes électorales. Il s'agissait là d'une nouvelle forme d'action pour faire connaître l'Espéranto et pour montrer qu'il est bien vivant. Cette forme de propagande ne fut pas approuvée par tous les espérantistes. Vous lirez dans ce bulletin l'opinion de Henri Rousseau, un article extrait de "Norda Gazeto" et des critiques parues dans "Le Travailleur Espérantiste", organe de la Fédération Espérantiste du Travail.

Cet été, ont eu lieu différents congrès, entre autres, celui de UEA à Pékin (2031 participants), celui de SAT à Bratislava. J'ignore si des Normands y sont allés. Par contre, vous lirez le compte rendu du stage de Plouezek qui est devenu de plus en plus célèbre.

A noter dans les actions passées un interview de nos amis du Havre par la Radio Catholique Normandie.

Il nous faut maintenant penser à l'avenir et enseigner notre langue pour que de nouveaux espérantistes profitent des manifestations importantes qui auront lieu durant l'année 2005 : l'an prochain, nous fêterons l'anniversaire du 1er congrès d'Espéranto à Boulogne en 1905 : toutes les associations espérantistes françaises se regrouperont à Boulogne sur Mer avec les associations britannique et belge, durant les fêtes pascales. Le congrès mondial aura lieu à Vilnius en Lituanie et le congrès de SAT à Zagreb en Croatie. Vous lirez à ce sujet une invitation de Povilas JEGOROVAS, Président de l'Association Espérantiste Lituanienne.

En Normandie, Yves NICOLAS continue d'organiser des tournées d'espérantistes étrangers. Durant le mois de décembre, Miĥaelo Bronŝtejĥ (de Tihvin dans le nord de la Russie), écrivain, poète et chanteur visitera la France de Thionville à Angers et sera reçu en Normandie par les groupes de Rouen, Le Havre et Hérouville.

Il n'est pas prévu d'événements majeurs dans notre région durant l'année 2005. Les Normands continuent d'être la "lanterne rouge" du mouvement espérantiste, ce qui est confirmé par les résultats électoraux de la liste E.D.E. Nous manquons de militants; la relève nécessaire ne se manifeste pas. Il nous faudra aussi résoudre le problème organisationnel de nos 2 associations: la Fédération Normande et l'Union des Espérantistes de Normandie. Il nous faudrait tenir une Assemblée Générale statutaire : Y-a-t-il un groupe volontaire pour l'organiser ?

En attendant, continuez d'apprendre, de pratiquer et d'enseigner. La cause espérantiste en vaut la peine.

Le Rédacteur : Petro KIJO

Eŭropia Balotado 2004

REGIONOJ	VOĈOJ	PROCENTOJ
Grande région Nord-Ouest	799	0,03 %
Grande région Ouest	4926	0,19 %
Grande région EST	5336	0,24 %
Grande région Centre	2174	0,15 %
Grande région Sud-Ouest	3687	0,15 %
Grande région Sud-Est	2559	0,09 %
Ile de France	5789	0,21 %

La rezulto estas kontentiga ĉar la malgrandaj organizoj ne povis deponi bultenojn en multaj voĉdonejoj pro financaj kialoj. Aliparte, la UFE-estraro malaprobis la kandidatiĝon de EDE. Notinde ke 10000 bultenoj estis disponeblaj en la 60 voĉdonejoj de Aix en Provence, ankaŭ multaj en Elzacio. Post la televida EDE kampanjo, 150 novaj lernantoj aliĝis al la per-reta Esperanto-kurso. En Ile de France, 1.500.000 EDE cirkuleroj estis senditaj. 764.000 balotiloj estis disponeblaj en la voĉdonejoj. Georges Kersaudy kiu kondukis la EDE liston ricevis 5789 voĉojn. 10 listoj de aliaj kandidatoj ricevis malpli da voĉoj.

NORDA GAZETO

1°) Kvankam ili estas tre etaj, tiuj rezultatoj estas surprizige kontentigaj, se oni konsideras la minimuman faritan propagandon. La nura reklamo estis la bona televida filmeto ; krom ĝi, la senmoneco de niaj amikoj tre ĝenerale ne ebligis presi nek afiŝojn, nek programinformilojn, nek balotilojn. Tiel almenaŭ en Bas-Normandio, la oficiala afiŝtabulo N°7 al ni atribuita kaj rezervita, escepte de 8 kazoj en 5 komunumoj, restis virga kaj muta.

2°) La rezultoj varias de regiono al alia, de 0,02 % (Pikardio), al 0,31 % (Alzacio), 15-oble pli! Tia diferenco verŝajne ne fontas de malsamaj niveloj de la lingva konscio de la loĝantoj, sed de la intenseco de la surloke farita reklamado. Ekzemple, la rekordo kiun mi trovis en "Le Monde" apartenas al la urbo Saint Briec : 0,77 %

3°) Se oni detale observas la rezultojn de kelkaj malgrandaj komunumoj, oni konstatas ke la esperantistoj mem, ĝenerale ne voĉdonis por la esperanta listo. Tio estis private kaj anticipe anoncita kaj agnoskita : malgraŭ nia amo al la ideo de komuna neŭtrala lingvo, ĝenerale ni konsideras ke estas pli gravaj sociaj prioritatoj ol la lingva. Do, verŝajne la 25.000 personoj kiuj voĉdonis por EDE ne estas (ĉiuj) esperantistoj. Despli bone ! La modesteco de niaj rezultoj ne signifas ke nur 25.000 personoj en Francio interesiĝas pri Esperanto ; ĝi nur signifas ke ankaŭ la neesperantistoj, eĉ se ili havas simpatian por nia ideo, havas aliajn prioritatojn, kiel ni mem. Ni ne varbos voĉdonantojn inter partiaj aktivuloj aŭ politikizitaj civitanoj ; nia ĉasgrundo devas do esti la sindetenularo. Tio konfirmas min en la ideo ke esperanto devas esti la nura ero de nia programo.

4°) Tiuj rezultoj devas nin kuraĝigi kaj instigi **niajn naciajn organizaĵojn finance se eblas, kaj almenaŭ morale kaj organize, subteni** la gratulendajn kaj dankendajn kuraĝulojn kiuj sin ĵetis en la politikan agadon. Tiu baloto estas nur komenco, nur provgalopeto ; ĉiuj idedefendaj partioj modeste komencis, havis sian "dezertotiron" ; ni povas fari multe pli bone, mobilizante la esperantistaron por ioma loka facila agado ; mi estas certa ke niaj kandidatoj jam ĉerpis instruojn de tiu unua eksperimento. Mi esperas ke ke la listokapo faros sufiĉe disvastigitan sintezan raporton pri la faritaj lokaj agadoj, akiritaj instruoj kaj pri estontaj intencoj.

5°) Ni adoptu la aristotelan aforismon : "Commence, car le commencement est plus que la moitié du tout"
"Komencu ĉar komenco estas pli ol duono de la tuto"

Henri ROUSSEAU
en Mathieu (14)

FET esprimis dubojn pri kampajno de EDE en Eŭropa voĉdonado. Jen resumo de rezultanalizo :

1°) varbada vidpunkto: La kampajno de EDE ja taŭgis (kresko de nombro da inform kaj kursopetantoj) Ĝi ebligis rimarkindan konsciiĝon de ni mem, pri ni mem kaj estas antaŭenpuŝo por ni.

2°) politika vidpunkto : Nun klaras ke EDE konsideras sin kiel politikan partion kaj ne kiel Esperanto-asociacion. Dezirindas ke nia E-Movado en Francio traktu EDE kiel politikan partion. Ununura partio, kiu esence apogas kaj agadas por ke Esperanto estu respektata kaj instruata.

3°) movada vidpunkto: tiu aspekto de la problemo estas la plej tikla. Dum la kampajno aperis ke EDE-anoj tre akre kritikis niajn asociojn kaj eĉ pensis ke EDE devus flankenmeti la "tradician" E-movadon. ... Feliĉe, tiu rezonado ŝajnas tre malplimulta en EDE. Alia tikla afero kuŝas en la traktado al aliaj politikaj partioj : Insultoj kaj fiaj vortoj estus katastrofaj kaj nur servus al ridindigo de nia afero. Siaflanke, E-movado plu agados por Esperanto ĉe gravaj kaj demokratiaj partioj por senĉesa kaj senlaca agado.

Resumo de artikolo aperinta en "Le travailleur Espérantiste"
organo de Fédération Espérantiste du Travail

Centenaire du 1er congrès mondial d'Esperanto Boulogne sur mer 2005

Certains se plaignent de la division des espérantistes français

ET BIEN ! Ils se réuniront tous à Boulogne du Vendredi 25 au Mercredi 30 Mars 2005 (Pâques)

Adhérents de la FFEA, de GEE, d'Esperanto-France, de FET, d'IFEF, de SAT Amikaro, d'Esperanto-Jeunes, de FKEA, de Esperanto Asocio de Britio, de Belgaj asocioj, et individuels non adhérents, VENEZ !

Le programme complet, les bulletins d'adhésion et de réservation hôtelière sont téléchargeables à partir du site Internet de la rencontre : www.boulogne2005.com.

ATTENTION: Le parc hôtelier et les salles de réunion de Boulogne obligent à limiter à 500 le nombre de congressistes. Il y a déjà de nombreuses inscriptions. N'attendez pas

90-a Jubilea Universala Kongreso de Esperanto Vilnius Litovio

Nome de Loka Kongresa Komitato de la 90-a jubilea Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos la 23-30an de Julio 2005 en ĉefurbo de Litovio, Vilnius, mi havas honoron kaj respondecon bonvenigi vin ĉiujn al Litovio por partopreni en tiu ĉefa ĉiujara internacia esperantista manifestacio. Tamen tiu-ĉi kongreso ne estos vica : ĝi estos jubilea, ĉar la 90a, kaj multe pli grave ĝi okazos 100 jaroj post la unua Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en 1905 en Boulogne sur mer. Do, en Vilnius ni kune festos 100 jarojn de Universalaj Kongresoj, 100 jarojn de egalrajta kaj demokratia internacia komunikado, 100 jarojn de aktiva dialogo inter kulturoj. Gravas ankaŭ tio, ke sekvontjara Universala Kongreso okazos en la lando kiu estas tiel forte ligita kun vivo kaj agado de la kreinto de Esperanto, d-ro Ludoviko Zamenhof kaj kun ekesto de Esperanto ĝenerale kaj kie estas tradicie forta Esperanto-movado. Litovio jam de longe meritas Universalan Kongreson, tamen pro historiaj kaŭzoj, nur nun, esperantistoj el ajna angulo de la mondo povos veni al siaj radikoj, al sia hejmo.

Litovio, nur antaŭ 15 jaroj, reaperis sur la mondmapo. Nun ĝi energie kaj vigle evoluas kaj kuraĝe eniras tutmondan komunumon. Tamen ĝi havas longan historion, antikvan lingvon, unikan kulturon, belegan naturon. Ĝia ĉefurbo Vilnius estas malnova kaj samtempe moderna multnacia kaj multkultura eŭropa urbo kiu famas pri sia unika malnova urboparto, pro nuna impeta kaj rapidega evoluo, pro toleremo al ĉiuj kulturoj, nacioj, lingvoj, pro gastamaj kaj bonvolemaj homoj. Nian ĉefurbon nun ofte oni nomas simbolo de nova Eŭropo.

Loka Kongresa Komitato kaj Litova Esperanto-Asocio faras multe jam nun kaj faros ĉion eblan estonte, ke la Universala Kongreso en Vilnius, kiel jubilea tutmonda esperantista forumo, estu ankaŭ eksterordinare grava, interesa, utila kaj memorinda evento por vi ĉiuj. Ni kune, helpe de Litovia Registaro, urba municipo de Vilnius kaj aliaj litovaj ŝtataj instancoj strebos ke vi ĝuu la urbon, la landon, la kongreson kaj ke vi ekhavu dum la kongreso la plej belajn impresojn pri via gastado en Litovio.

Ni, en Litovio, konsideras Universalan Kongreson de Esperanto kiel eventonde nacia graveco kaj dediĉos ĉiujn niajn fortojn kaj kapablojn por sukcesigi ĝin. Ni deziras ke ankaŭ, laŭ kvanto de partoprenantoj, tiu ĉi kongreso estu rekorda. Por litovaj esperantistoj venonta Universala Kongreso estas kaŭzo ankaŭ por ĝenerale progresigi nian Litovan Esperanto-movadon ĉiudirekten.

Do, bonvenon al Vilnius, bonvenon al Litovio. Ni kune fortigu nian solidarecon, ni progresigu nian movadon, ni studu ĝiajn problemojn.

Povilas JEGOROVAS

Prezidanto de Loka Kongresa Komitato

Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

STAĜO EN PLUEZEK (Bretonio)

La 15an de Aŭgusto 2004, en Francio, ĉiuj lernejoj estis fermitaj. Ĉu ĉiuj ? Ne !

En Bretonio, en malgranda vilaĝo, amaso da gelemantoj ankoraŭ kaj ĉiam retroviĝis en la korto de komunuma lernejo por ekstudi, studi aŭ plustudi Esperanton. Certe, vi divenas ke mi parolas pri la internaciaj renkontoj en Pluezek kiuj okazis por la oka fojo de la 14a ĝis la 21a de Aŭgusto.

Ni estis pli ol 160 partoprenantoj. Multaj estis jam revenintaj kaj plezure retrovis konatojn. La nov-alvenantoj rapide sentis sin komforte. La 14an de Aŭgusto, en la festsalono, kun ĉeesto de urbestro, la vicprezidanto Jean-Pierre Ducloyer varme akceptis nin kaj poste ni retroviĝis por interkonatiĝa vespermanĝo.

La organizintoj preparis riĉan programon kaj pripensis ĉiujn detalojn por ke la restado estu kiel eble plej agrabla por ĉiuj.

La partoprenantoj konsistis el Nederlandanoj, Hungaroj, Britoj, Bulgaroj, Japanoj, Ĉinoj kaj ankaŭ kompreneble, Francoj (!!!). Ankoraŭ foje, oni povis konstati, kiel efika estas la internacia lingvo de Zamenhof kaj kiel estas kontentigodone paroli senpere kun fremduloj.

Ekde la 15a de Aŭgusto, ni sekvis precizan horplanon. Matene, de la 9a ĝis la 12a, ni tre serioze laboris ĉe la lernejo. Neniu malfruis kaj dum la paŭzo ni provis ne "krokodoli".

Posttagmeze, eblis turismi por malkovri la belegajn ĉirkaŭaĵojn de Pluezek gviditaj de Jeanne kaj Helène.

Multaj atelieroj estis proponitaj: joko, informatiko, ĥorkanto, teatro kaj por la unua fojo kurso de bretona lingvo (multe pli malfacila ol Esperanto diris al mi iu).

Eblis trapasi unua-kaj-duagradajn ekzamenojn.

Vespere, post bona labortago, ni retroviĝis en la festsalono por aŭdi la vojaĝrakontojn de Zef kiu biciklas tra la mondo, "kunportante" Esperanton en siaj pakaĵoj, por danci bretone, por kanti maristajn kantojn kun la loĝantoj de Pluezek kaj ankaŭ kun kelkaj feriantoj kiuj trovis ke oni parolas tre strangan "bretonan" lingvon en tiu asembleo !

Okaze de unu el tiuj distraj vesperoj, mi havis la plezuron rekoni Sébastien Erhard en la talenta aktoro kiu kulis por ni "Exercice de style" de Raymond Queneau en Esperanto, kompreneble ! Li ludis sola kaj ĉiuj aplaudis sian bonegan prezentadon.

La lastan vesperon, la partoprenantoj de atelieroj prezentis kantojn, teatraĵojn. Niaj fremdaj amikoj kantis kanzonojn de siaj landoj. Tiuj kiuj bonvole prizorgis manĝojn prezentis humoran version de olimpikaj ludoj.

La renkonto finiĝis. Gaje, ni diris al ĉiuj : ĝis revido, kaj eble ĝis la venonta jaro !

Nia regiono estis bone reprezentita: estis 5 partoprenantoj el Seine-Maritime kaj Catherine Domingo venis saluti kaj kuraĝigi nin.

Dankegon al la tuta grupo Esperanto 22 kiu sukcese organizis tiujn renkontojn kaj ĉiam estis ĝoja kaj sindonema.

Certe, se iam vi estos en Pluezek, vi deziros reveni !

Suzanne HELBERT
Grand Quevilly / Rouen

LE HAVRE:

Sekve de la agado de nia amiko Bernardo Dufresne, de artikolo kiun Alano Chalm aperigis, pasintan jaron, en la tri gazetoj de Le Havre kaj de la reklamo farita okaze de la eŭropa voĉdonado, gazetisto de RCF (Katolika radio) kontaktis Silvia Caron kaj Alano Chalm por intervjuo. Ni parolis dum 25 minutoj. La aŭskultantaro de RCF ĝenerale konsistas el 25000 homoj ; RCF elsendas en tuta Normandio.

Tiaj intervjuoj povas okazi en ĉiuj kluboj kiuj antaŭe devas studi la aferon kaj prepari bonajn respondojn. Eble, la diversaj lokaj medioj estas bonvolemaj akcepti niajn artikolojn aŭ paroladojn ĉar ili ne ĉiam havas temojn por plenigi siajn paĝojn aŭ elsendojn ! Do, necesas cerbumi por interesi ilin per bonaj ideoj.

Dum eŭropa voĉdonado, ni gluis afiŝojn sur la panelojn kaj enmetis balotilojn en la letterskatolojn.

Ni esperantigis la siton de la "Klubo de la Suno kaj de Oceana Pordo" ; tiu esperantigo de interretaj sitoj esras tre bona kaj senkosta. Multaj institucioj tradukis sian siton en plurajn lingvojn ; kial ne proponi al ili tradukon en Esperanton?

Bernard Dufresne deziras fari libron kun listo de la diversaj komercoj kaj institucioj kie eblas paroli Esperanton. Ja, ju pli ni montros ke esperanto estas tre uzata, des pli facile ni trovos interesatojn. La intervjuisto insiste diris al ni ke malgraŭ la tre grandaj avantaĝoj , ĝi ne estas sufiĉe diskonata ! Se vi konas adresojn pri tio sendu ilin al la Esperantista Havra Grupo, 44 rue Gustave Lennier 76600 Le Havre. Estus interese por ni scii la adresojn de ĉiuj grupoj en Normandio *En sekvantaj paĝoj de tiu bulteno, mi skribos pri tio. La Redaktanto*

Kelkaj radioj elsendas en Esperanto : Pekino, Varsovio, Vatikano, Romo. Malfeliĉe, Berno kaj Vieno ne plu elsendas parte, kaŭze de nesufiĉa reago de la esperantistoj ! Por bone aŭskulti ilin, necesas posedi taŭgan radio ricevilon. Mi konsilas al vi : Sony ICF - SW7600GR kiu kosta 250 Eŭrojn Bedaŭrinde, ĉio estas skribita usonlingve sur tiu japano aparato kaj mi skribis al Sony por plendi pri tio.

Skribu al tiuj radioj por montri ke multaj interesiĝas pri ilia agado ; tiel vi kontribuos al daŭrigo de tiuj tre gravaj elsendoj por la esperanta mondo. Ankaŭ, estas tre bona metodo por plibonigi sian lingvo-kapablecon.

Alain CHALM
1430 route de Mirville 76110 Vattetot / Beaumont

ADRESOJ DE RADIOJ:

Vi skribu al ili por peti hortabulojn kaj ondolongojn
Post aŭskultado, vi skribu por gratuli kaj kuraĝigi ilin

Radio Polonia, Esperanto redakcio, Skrytka 46, PL-00-977 Warszawa Pollando
Radio Vatikana Esperanto redakcio, VA - 00193 Città 88 del Vaticano
Ĉina radio internacia, Esperanto sekcio, ĈRI - 36 Poŝtkesto 4216, Ĉina Popola Respubliko 100040
RAI Internacia Esperanto fako, C.P. 320 Centro Corr. IT - 00187 ROMA Italio

NORMANDAJ GRUPOJ:

En nia regiono, preskaŭ ĉiuj samideanoj estas disigitaj izoluloj, ne membroj de klubo.
Pro tio, la grupoj estas malmultaj:
En Seine-Maritime: Le Havre, Yvetot, Rouen/Grand Quevilly
En Eure: neniuj grupoj
En Calvados: Hérrouville/Caen
En Manche: Cherbourg
En Orne: neniuj grupoj

NORMANDA BULTENO:

Notre bulletin est envoyé aux adhérents de l'Union des Espérantistes de Normandie.
Est adhérent de l'Union toute personne payant un abonnement - cotisation.
Notre bulletin est aussi adressé gratuitement à toute personne dont on nous donne l'adresse (nouveaux élèves, membres d'autres associations, etc) Après l'envoi gratuit de quelques numéros, ces personnes régulent leur cotisation si notre bulletin les intéresse; sinon elles sont rayées de notre fichier.
L'autre association est la Fédération Normande des Centres Culturels Esperanto: elle est uniquement composée des adhérents de Esperanto - France (Union Française d'Espéranto) affiliée à UEA.
Les deux associations normandes sont donc constituées des mêmes adhérents et dirigées par le même Conseil d'Administration. Il faudrait trouver une solution pour supprimer cette dualité !

ĈU VI PAGIS VIAN ABONON POR 2004 ?

Listo de pagintoj: Gesinjoroj Bachimont, Bessière, Bettencourt, Blactot, Caron, Chalm, Colombel, Corrieu, Duval, Dubois, Dubuc, Defrance, Dufeu, Dufresne, Duhamel, Freslon, Gibert, Guérout, Guerre, Guilmot, Haulard, Hubert, Huet, Jourdain D., Jourdain M.L., Jouvin, Klein, Lamy, Lebrun, Lecouvreux, Leguillon, Lemarchand, Lesueur, Levy, Loisel, Magerel, Marie F., Mary P., Michaud, Millet, Nardin, Nicolas, Paumier, Père Marc, Poupinet, Quillaud, Rauch, Robiollé, Rolland, Rousseau, Sénécal, Séry, Tailpied, Tanguy, Touileb, Turlin, Zilliox.
Si votre nom ne figure pas dans la liste ci-dessus, veuillez me faire parvenir votre cotisation.
Quelques adhérents n'ont pas réglé l'année 2003; je leur ai adressé une lettre de rappel. Sans réponse, ce bulletin sera le dernier qu'ils recevront

Eltiraĵo el "Norda Gazeto" por montri ke Esperanto ebligas fidele traduki la naciajn poeziajn originalojn:

Les chats

Les amoureux fervents et les savants austères
Aiment également, dans leur mûre saison
Les chats puissants et doux, orgueil de la maison,
Qui, comme eux, sont frileux et, comme eux, sédentaires.

Amis de la science et de la volupté,
Ils cherchent le silence et l'horreur des ténèbres;
L'Erèbe les eût pris pour ses coursiers funèbres,
S'ils pouvaient au servage incliner leur fierté

Ils prennent en songeant les nobles attitudes
Des grands sphinx allongés au fond des solitudes
Qui semblent s'endormir dans un rêve sans fin.

Leurs reins féconds sont pleins d'étincelles magiques,
Et des parcelles d'or, ainsi qu'un sable fin,
Étoilent vaguement leurs prunelles mystiques.

Charles Baudelaire

La katoj

Fervoraj geamantoj, doktuloj plej senridaj,
Per sama gusto amas, je pleno de l'sezono,
La katojn fortajn, mildajn, orgojlon de la domo,
Ĉar same fridotimaj kaj same hejmosidaj.

Amikoj de la scio, amikoj de l'volupto,
Silenton ili serĉas, hororon de l'tenebro;
Ereb', ilin elektus rajdbestoj de l'funebro,
Se povus ĉi-fiero kliniĝi al servuto.

Revante ili prenas la noblon de la pozo
De tiuj grandaj sfinksoj kuŝantaj en ripozo
Kaj ŝajne ekdormantaj en rev' senfine ajna.

Per sparkoj sorĉaj fajras la lumbo erotika
Kaj brilaj oraj punktoj, kiel de sablo fajna
Eklumas en prunelo mistera kaj mistika.

Esperantigis: Elgo

Erèbe: (Myth.gr.) L'endroit le plus sombre des enfers; Frido = malvarmo; ajna = quelconque; sparko = étincelle
lumbo = lombes, reins, hanches

PEKINA DEKLARO

La 89a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Pekino de la 24a ĝis la 31a de Julio 2004, kun 2031 partoprenantoj el 51 landoj,

- **traktinte** la temon : *Lingva egaleco en internaciaj rilatoj*,
- **notante** ke la jaro 2004 markas 50 jarojn da oficialaj rilatoj inter UEA kaj UNESKO,
- **memorante** , ke rezolucioj de Unesko notis la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo kaj rekonis ke tiuj rezultoj respon-
das al la celoj kaj idealoj de Unesko,
- **notante** la raporton pri homa evoluigo 2004 de la Evoluiga Programo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu asertas ke la libereco de esprimado kaj la uzado de lingvo estas nedisigeblaj,
- **alte taksante** la agadon de la ĉina registaro, kiu cele al pli justa kaj diverseca aliro al internacia interkom-
preniĝo, subtenas la instruadon kaj utiligon de Esperanto, konforme al la spirito de la rezolucioj de Unesko

DEKLARAS

- ke demokratia kaj egalrajta komunikado en internaciaj rilatoj estas esenca por internacia interkompreno kaj paca kunlaboro surbaze de egalaj lingvaj rilatoj,
- ke estas bezonata nova internacia lingva ordo, kiu garantiu egalecon, diversecon kaj demokration en lingvaj aferoj kaj efikan komunikadon inter nacioj kaj aliaj homgrupoj lingve malsamaj, ĉar en la nuna monda lingva situacio, kun krekanta superrego de iuj lingvoj super aliaj, ne eblas realigi tiujn principojn.
- ke neŭtrala komuna lingvo estu kerna elemento en tiu ordo, por atingi unuecon en diverseco inter la diversaj lingvoj kaj kulturoj je internacia nivelo,
- ke sekve la internacia lingvo Esperanto, pruvinte dum pli ol cent jaroj sian utilecon kaj praktikecon, meritis seriozan konsideron fare de internaciaj organizoj, ties membro - ŝtatoj kaj ĉiuj personoj kaj organizaĵoj de bona volo, kiuj respektas kaj deziras pacon kaj pacan kompreniĝon en egaleca etoso en nia hodiaŭa mondo,
- ke por krei novan internacian ordon, kiu kontribuos al internacia kompreno kaj mondpaco, necesas forte subteni la enkondukadon de Esperanto en lernejojn, konforme al la spirito de la Unesko rezolucioj, ĉar tio faciligas lingvolemradon ĝenerale kaj antaŭenigas aliron al la mondo.

DEKLARO de la 77a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)

La 77a Kongreso de SAT, kunveninta de la 14a ĝis la 21a de Aŭgusto 2004 en Bratislava,

lanĉas solenan alvokon al la registaroj de landoj, kiuj ankoraŭ ne subskribis la konvencion de Otavo, ke ili rapide subskribu ĝin por ke universaligu tiu Konvencio pri la detruo de kontraŭpersonaj minoj kaj pri la malpermeso de ilia uzo, produktado kaj stokado;

- emfazas la nepran neceson de kultura kaj kleriga laboro por batali kontraŭ nescio kaj dogmemo, kiuj estas gravaj obstakloj al paca kaj senperforta forigo de la nuna fia sociordo;
- atentigas , ke vortoj kiel "klasbatalo", "kamarado", "socialismo", "laboristo", kvankam ilin misuzis diversaj reĝimoj kaj sociaj grupoj, priskribas daŭras realecon, kaj ke estas tasko de nia asocio redoni al tiuj vortoj ilian ĝustan signifon;
- alvokas ĉiujn progresemajn esperantistojn aliĝi al SAT kaj kunagadi en ĝi;
- alvokas progresemajn neesperantistojn kunhelpi per siaj propraj rimedoj por levi la nivelon de la mond-skala perlingva komunikado ĉe la laboristaro, por kiu celo, Esperanto prezentas la plej taŭgan solvon.

Jen ĉi-supre la deklaroj faritaj dum kongresoj de UEA kaj SAT. Komparante ilin, vi komprenos ke :
UEA estas POR-Esperanta asocio

SAT estas PER - Esperanto asocio

La Septembra Normanda Bulteno aperas oktobre . Mi petas vian pardonon pro la malfruo

La Redaktanto